# ILERA
# Bulteno n-ro 68

Aprilo 2005
Redaktis: DL6FCV kaj PY3DF

*Internacia Ligo de Esperantistaj RAdioamatoroj *

## ESTRARO


**Prezidanto:** Wolf Krüger,DL1CC
Postfach 7223
15872 Eisenhüttenstadt, GERMANIO
Tel/Fakso: +49 3364 412946
PR: DL1CC@DBØFRO.#brb.deu.eu
E-poŝto: dl1cc@aol.com

**Vicprezidanto:** Hans Welling,DJ4PG
zum Ortenbrink 42
49205 Hasbergen, GERMANIO
Telefono: +49 5405699 33
Telefakso: +49 5405 699 31
PR: DJ4PG@DBØSM.#nds.deu.eu
E-poŝto: dj4pg@t-online.de

**Sekretario:** Lenio Marobin,PY3DF
60 Tudor Court
King Henry's Walk
London, N1 4NU,BRITIO
Telefono: +44 20 7249 4737
E-poŝto: marobin@marobin.net

**Kasisto:** Ian Mac Dowall,G-SWL
40 Danehurst Road
WALLASEY, CH45 3JJ, BRITIO
E-poŝto: MacDowallian@aol.com

**Bultenisto:** Fritz Lautenbach,DL6FCV,
Abstor 21, 36037Fulda, GERMANIO
Tel/Fakso: +49 661 77627. E-poŝto
f-lautenbach@fulda-online.de


**http://ttt.esperanto.org/internacia/ILERA/**

❐ *Administrajn demandojn/informojn (pri adres-ŝanĝo, ktp) sendu ĉiam al la Sekretario. Pri ne ricevo de bulteno, kontaktu unue vian Landan Reprezentanton (LR).*



QTH: Videbla en la mezo supren kun la granda palmoanteno

## Vintra feriado en varma regiono

Esperanta-Geedzparo el Kanaria Insulo La Gomera ofertis sian feriodomon en la montaro. La kasisto de ILERA, Ian Mac Dowall, kaj mi uzis tiun eblecon fuĝi el la malvarma Eŭropo.

La 5-an de januaro ni atingis la montaran vilaĝon Alajeró en la suda parto de la insulo (750 m super la marnivelo) kaj 10 km for de la konata ferioloko Playa de Santiago. En la unuaj tagoj estis vento kaj pluvo. Tiom da pluvo neniu loĝanto ankoraŭ spertis. Pro la intensa pluvo la nivelo de la akvo ĉe la elektroproduktejo estis tiel alta, ke tio kaŭzis la mankon de kurento dum unu tuta tago.

La kunportita IC-706 bone funkciis kaj la plej grandan palmon ni uzis por la anteno (Kelemen-dipolo por 40/20/15/10 m). Inter la 7-a kaj 30-a de januaro el Alajeró kaj de la 15-a ĝis 27-a de februaro el San Sebastian ni faris 919 QSO-ojn kun 123 DXCC-landoj. 61 kontaktoj estis en Esperanto. Regule okazis stabilaj kontaktoj kun Enivaldo (PT2CA) kaj Vaske (PY3ACE) en la Sudamerika rondo. Ankaŭ G0OOS, JA1FXZ, DJ4PG, RA0AN kaj aliaj estis tre aktivaj. Ni atingis ĉiujn kontinentojn. Pli ol la duono de QSO-oj estis kun Eŭropo. Tre raraj kontaktoj okazis kun 3G0YP, ZD7BG, 3B9DR, S92SI kaj aliaj raraj stacioj. Mirinde estis 8 QSO-oj kun VP8 kaj 15 QSO-oj kun CO. Kutime ni aktivis en 14.266 aŭ 21.266 mHz. Ĉiu havis eblecon atingi nin ankaŭ ekster la oficialaj rondoj. Vespere propagado bone funkciis al Azio kaj nokte al Mezameriko en 40 m.

Ankaŭ alvenis internacia Esperanto-geedzparo (Germanio/Ruslando) kaj Esperantistino el Taĝikio. Niaj gastigantoj estis Esperantistoj el Hispanio kaj Peruo. Komune ni migris (nun estis bona suna vetero) tra la montaro. Unu panoramo sekvis la alian kaj ni bone vidis la najbarajn insulojn (Tenerife, El Hiero, La Palma). Poste ni pasis unu semajnon en Playa de Santiago, kie ni tuj vidis la Yagi-antenon de EA8KT sur la plej alta punkto. EA8KT laboras en la radiostacio de La Gomra. Kiu volas viziti lin


kaj ne trovas iun en la domo, povas demandi lian edzinon, kiu laboras en la najbara vendejo.

Poste ni transloĝiĝis al San Sebastian, la ĉefa haveno de la insulo. Nia loĝejo tute ne taŭgis por radioamatorismo, ĉar de tri flankoj la loko estis flankita (kovrita) de montoj (1000 m alta kaj eĉ pli). Nur al ZD7, ZD9 kaj eble al ZS la vojo estis iom libera. Post unu semajno ni ŝanĝis denove iom flanken kaj ĉirkaŭ 500 m pli alten. Ni loĝis nun en la plej alta apartementdomo en la plej alta etaĝo kaj starigis la antenon sur la tegmento. Ekde la 15-a de februaro ni estis denove en la etero. Bedaŭrinde sur la najbara tegmento iu bredis kolombojn. Tiu homo tute ne ŝatis la antenon. Kelkfoje frumatene kuŝis la anteno sur la tegmentĝardeno. Tie ni pli-malpli estis aktivaj du semajnojn en la etero.

La lastajn 18 tagojn ni feriis sur la insulo Tenerife. Bone ni atingis la havenon Los Cristianos. Al tiuj, kiuj hazarde ferios tie, mi proponas viziti la fiŝrestoracion „Casa del Mar", kies posedanto estas EA8AJY kaj ankaŭ EA8VL laboras tie. Se vi forlasas la havenon per aŭtoŝoseo, tiam vi trovos, ke la restoracio estas la unua domo dekstre. La lastajn tagojn ni bone feriis en Costa de Adeje.

Jam estas planita la sekva vojaĝo al AROMA-JALTA-Esperanto-feriado sur la duoninsulo Krimeo en la Nigra Maro. Espereble oni alvokos UU4JYA aŭ UU/DL1CC inter la 24-a de aprilo kaj la 17-a de majo en la konataj frekvencoj.
Saluton kaj ĝis la baldaŭa reaŭdo de

Wolf, DL1CC



Stacio EA8/DL1CC en Alajero sur murŝranko

## La 56-a IFEF Kongreso en Hungario

Inter la 8-a kaj 15-a de majo 2004 okazis en urbo Sopron la 56-a IFEF (fervojista kongreso). Estas interese, ke la kongreson komune aranĝis la aŭstraj kaj hungaraj gekolegoj. Dum la kongreso funkciis speciala porokaza radioamatora stacio kun voksigno HG56VEK kaj faris eterkontaktojn kun la tuta mondo. Pro la kontakto la diverslandaj radioamatoroj ricevis belan, koloran konfirmkarton. La celo de la radiostacio estis informi la radioamatorojn de la mondo pri la eventoj de la kongreso kaj pri Esperanto.
D-ro Imre Ferenczy HA1UD raportis: iferdr@axelero.hu

## Ham-Radio

En la lasta semajnfino de junio 2004 DJ4PG, DG6JWA, Ian G-SWL kaj DL1CC partoprenis en la plej granda radioamatora renkontiĝo de Eŭropo en Friedrichshafen (HAM-RADIO) ĉe la lago Bodensee. La kvaropo funkciigis informbudon pri Esperanto ĝenerale kaj pri ILERA speciale. Multaj el la preskaŭ 20.000 partoprenantoj interesiĝis pri ILERA kaj Hans (DJ4PG) lerte eĉ dufoje gvidis publikan fulmkurson por interesuloj. Nur 20 metrojn for deĵoris ILERA-aninoj DJ0MCL kaj IT9ESZ ĉe la budo de Internacia YL-Klubo. El la ruldomo de Hans ni funkciigis la voksignon DF0ESP kaj gvidis Esperanto-rondon. Dum tri tagoj oni spertis tre interesan travivadon, kaj oni profitis la okazon ankaŭ por viziti budojn de aliaj radioamatoraj organizoj kaj fabrikistoj de radioamatoraj aparatoj. Post la evento ni vizitis Aŭstrion (OE9), Svislandon (HB9) kaj Liĥtenŝtejno (HB0). Ĉio estis tre interesa. Raportis: DL1CC




Ham Radio 2004
Maldestre-dekstren: Ian, G-SWL (kasisto), Hans DJ4PG, Boris UU5JK, Wolf DL1CC, Jozefo DG5JWA (sidanta)

## Germana Esperanto-Kongreso kaj insulaktivado (2004)

De la 28-a ĝis 31-a de majo Ian G-SWL (kasisto de ILERA) kaj Wolf (DL1CC) partoprenis en la Germana Esperanto-Kongreso. Dum la postkongresa vojaĝo ili vizitis denove la insulojn Rügen kaj Hiddensee. Poste ili feriis ekde la 10-a ĝis la 17-a de junio sur la insulo Wollin (IOTA EU 132). Tie ili aktivis per la voksigno SO1CC de 160 ĝis 6 m, atingis ĉiujn kontinentojn kaj faris pli ol 700 kontaktojn. Kelkfoje en 6m propagkondiĉoj malfermiĝis dum unu horo al Britio. En unu sola oportuno, eblis fari 72 kontaktojn, inter ili eĉ kvar QSO-ojn kun Gernezejo (GU). Ankaŭ vizitis nin dufoje SP1EG, kiu ankaŭ prizorgis la tranoktejon. Raportis: DL1CC

## Aktivigo Manksinsulo

En la dua semajno de septembro (precise vi ekscios pere de paketradio aŭ en la Esperanto-rondoj) DL1CC volas aktivigi Manksinsulon (GD) de 160 ĝis 6 metroj. Espereble multaj Esperantistoj alvokos lin.

## Leteroj

Estimata sinjoro,
Laste mi ekinteresas pri la ideo de amatora radiofonio, do mi skribas tiun ĉi mesaĝon al vi por eltrovi pli da informoj. Kiel agadas ILERA kaj kiel oni utilas membrĝon en ĝi.
Ankaŭ, mi serĉas informojn pri uzinda radioaparato por komencanta nivelo. Ĉu vi havas sugeston aŭ konsilon pri tio?
Multajn dankojn!
Gabriel Beecham
25 Highland Avenue, The Park, Cabinteely, Dublin 18, Irlando
*NRD: La Sekretario jam respondis rekte al ĉi tiu letero, sed ĉiuj ankaŭ povas kontribui.*

## Novaj membroj

597 CM8WG Guillermo Navarro Toledano, 2da. No. 72, entre 4 y 5, Rpto. Dessy, Santiago de Cuba, KUBO (07/2004)
598 PE1KOQ Hardo Bourguignon, Hugo Verriestraat 9, 5144 SB Waalwijk, NEDERLANDO, inekebou@knoware.nl (07/2004)
599 SM6XOM Göthe Svartfors, Sofiagatan 64 J, 416 72 Göteborg SVEDIO (07/2004)
600 BG2VBK Drako, P.O. Box 111-8, 110044 Shenyang, ĈINIO (07/2004)

## Adres-ŝanĝoj

| | | |
|---|---|---|
| IL-590 | LY3NTW | Juozas Racius, P.O. Box 364, 44006 Kaunas, LITOVIO jracius@takas.lt (01/2004) |
| IL-554 | DF3SM | Ulrich Stücker, Hertha-Savelsberg-Str. 10, 26871 Papenburg, GERMANIO |
| IL-206 | VE2ABV | Jean S. Sorel, 8795-A rue Paul Corbeil, St. Leonard, Quebec, H1R 3A3, KANADO |

## Forpasis

| | | |
|---|---|---|
| IL-504 | G8QR | Reg Brake (15.012004) |
| IL-317 | EA8EX | Francisco José Dávila Dorta (19.10.2004) |

## Nova Landa Reprezentanto (LR) en Pollando

Wieslaw Dyduch,SP1EG
ul. Goleniowska 82-2
70-840 Szczecin
Pollando

## Financa raporto

Post la forpaso de nia tiama Kasisto Jean-Jacques F6ILR, la financa raporto ne aperis dum kelkaj jaroj sur la paĝoj de la bulteno

Nia Kasisto Ian G-SWL post detala esploro de la antaŭaj konteltiroj kaj en konsulto kun la kasisto de UEA fine – post ŝvita laboro – povis prepari detalan raporton de la kontoj de ILERA. La kontoj troviĝas en dosiero formato EXCEL kaj estas haveblaj ĉe la Sekretario. Landaj Reprezentantoj (LR) ricevos paperan kopion, kiu povos esti plusendita al interesotoj en la respektiva lando. La saldo en la ĝenerala kaso en aprilo 2005 estis €72,60 kredita. La plej granda elspezo ĉe la kontoj de ILERA estas la jara kotizo pagata al UEA (€54,00 por la jaro 2004). Luado de salono dum UK ankaŭ formanĝis grandan pecon de la buĝeto. Dum la lastaj tri jaroj ILERA ne luprenis salonon. Multaj membroj ne pagas sian kotizon ĉu al sia LR ĉu rekte al la konto de ILERA ĉe UEA. Tio kaŭzas seriozajn problemojn precipe al LR, kiu devas elpoŝigi monon por fotokopiado kaj enpoŝtigo de la bulteno. En la pasinteco, bonkoraj estraranoj donacis monon por la salono dum UK. La presigo kaj enpoŝtigo de la bulteno al LR dum la lastaj jaroj ankaŭ dependas de donaco de estraranoj. Do, al ĉiuj estas petate pagi la jaran kotizon prefere rekte al sia LR. (PY3DF)

## LY9ØE – Kongresa Stacio de la 90-a UKE

Riĉardo LY2FN informas, ke la voksigno por la kongresa stacio dum la 90-a Universala Kongreso de Esperanto en Vilno (23-30 julio 2005) estos LY90E. Riĉardo aranĝas eblecon uzi lokan radioklubon, se tio estos konvena.

Lenio PY3DF (Ĝenerala Sekretario) partoprenos. Li diris : « *Mi mendis ĉambron ĉe Reval Hotel Lietuva, la ĉefa kongresejo. Mi esperas kunporti mian porteblan stacion YAESU FT-897D kun portebla teleskopa anteno. En kazo de manko de pli taŭga stacio, mi kredas, ke almenaŭ por eŭropaj kontaktoj, mia eta stacio sufiĉos* « .

Eventualaj partoprenontoj bv. kontakti PY3DF. Adreso ĉe la Ĝenerala Sekretario.

## El nia fotoalbumo...

### Aroma-Jalto (2005)




Maldekstre-dekstren: Ian G-SWL, Wolf DL1CC, Leonid UT2WL, Viktor UU4JM kaj Sjoerd PA3FLC

### 89-a UKE Pekino (2005)





UKE en Pekino – Maldeskre-dekstren:
Lenio PY3DF, BY-SWL, Renata F5RC, Iannic F6DXL, Frans KA3VYX

## Kubo (2004)



Kubo: maldekstre-dekstren: Ian G-SWL, Pedro CO2RP (Prezidanto de Federación de Radioaficionados de Cuba), Wolf DL1CC kaj Fidel Castro (sur la muro…)



Kubo – Radioklubo

**Ĉu vi jam pagis vian jaran kotizon? Via Landa Reprezentanto dankos pro via tuja reago!**